266
PREFECTURE D'ALGER
DEPÔT LÉGAL

1re Année — Mercredi 20 Septembre 1905 — N° 12

5 Centimes — LA — 5 Centimoj

ALĜERIA STELO

L'ÉTOILE ALGÉRIENNE

Petit Organe de Propagande Espérantiste de l'Afrique du Nord

BI-MENSUEL ★★★ DUONMONATA

Prix de l'Abonnement annuel		Kosto de la Jara Abono	
Algérie, Tunisie.....	2 fr. »	Alĝerujo, Tunisujo.....	2 fr. »
France	2 fr. 50	Francujo	2 fr. 50
Etranger.....	3 fr. »	Eksterfrancaj landoj.....	3 fr. »

Les Annonces sont reçues à l'Administration du Journal, 57, rue d'Isly, ALGER.
Prix sur demande

DIRECTEUR-FONDATEUR
Barthélemy BALS
ADMINISTRATEUR
Louis LANDES

La Anoncoj estas ricevataj al la Administracio de la Ĵurnalo, 57, rue d'Isly, ALGER.
Prezoj laŭ peto

AVIZOJ

Ni petas ĉiujn niajn kunfratojn sciigi, ke la nomo de nia ĵurnalo estas la ALĜERIA STELO, kaj ne ALĜERA. Ni petas ankaŭ ĉiujn el ili kiuj enpresas la supre diritan nomon, ke ili bonvolu ĝin korekti, kaj enpresi « La Alĝeria Stelo » anstataŭ « La Alĝera Stelo ».

Ili estus tre amindaj se ili bonvolus sciigi ankoraŭ, ke la fondintoj de tiu ĵurnalo estas nur Sinjoroj BARTHÉLEMY BALS kaj LOUIS LANDES, kaj ne alia ajn persono.

Ni sciigas niajn legantojn kaj abonantojn, ke tiu numero estas la lasta de la somera sezono. La kutima duonmonata elirado rekomencos la 5-an de oktobro. Ni komencos en tiu numero tre interesan rakonton de nia agema Konstantina kunbatalanto, Sinjoro BAISSAC.

Ni komencas hodiaŭ la tre gravan artikolon de nia lerta kunlaboranto, Grafo ALBERT GALLOIS : « Vojaĝo ĉe Okcidentafrikaj Bordoj ».

LA REDAKCIO.

AMBICIA SED SENPRIPENSA

Oni anoncis Abaton Bernard kaj tuje aperis juna pastro, belkreska, freŝe razita, zorge kombita, kies kolumo iom, tro superante, kontrastis per sia senmakula blanko sur lia kolorvizaĝo iom flava, de brunulo.

Li trairis la salonon per sengêna marŝo kaj sufiĉe granda ŝajno, balancigante sian pastran veston kaj la silkajn franojn de sia rubandzono tute same kiel romana altrangulo.

Li direktis sin al la subprefektedzino, ĝentile riverencis antaŭ ŝi, kaj alparolis jene : « Sinjorino, de mallonge nomita vikario ĉe via urbo, mi sciiĝis ke hodiaŭ estas la tago kiam vi akceptas gevizitantojn, kaj mia devo estas respekte saluti la edzinon de la plej altgrada riprezentanto en tiu ĉi urbo de nia registaro. »

Tiuj paroloj kvankam parkere ellernitaj ne estis malbone eldiritaj kaj ili tuj gajnis la simpation de la kunvenaro.

La ĉeestantaj sinjorinoj, kies natura sciemeco estis incitata de tiu vizitanto komencis elmontri iajn signojn de sia aprobo, de sia kontentiĝo, kiuj pligrandiĝis ankoraŭ kiam la subprefektedzino siavice ekparolis.

Ja, tre afable ŝi respondis al la juna Abato, per gratulaĵoj pro liaj konataj nuntempaj ideoj, dankoj pro lia neatendita vizito kaj multaj bondeziroj pri bonveno.

Poste prezentinte lin, ĝenerala fariĝis la interparolado, kaj Abato Bernard sciis lerte kaj ĝentile respondi al ĉiuj adresataj demandoj. Tamen, iom post iom la temoj iĝis pli malfacilaj ĉar oni ektraktis religiaĵojn ; kaj vigla. malica sinjorineto, senaĝa pro siaj blondkolorigitaj haroj kun incitetaj nigraj okuloj ekparolis pri la

konfeso. La konfeso, tiu religia praktikado katolika per kiu oni konfesas siajn plej sekretajn, intimajn kulpaĵojn por ricevi la dian pardonon.

La juna kaj ambicia Abato baraktis por ne transpaŝi siajn pastrajn devojn kaj samtempe ne malplaĉi al siaj (eble potencaj) kontraŭparolantinoj, kiuj, unuvoĉe, proklamis tro peniga tia kutimo.

« Peniga ankaŭ por la konfesprenanto, li rediris, precipe kiam li estas juna kaj ankoraŭ nesperta, tiel mi memoras ke mia unua konfesantino kulpigis sin pri adulto..... »

Lian rakonton interrompis la eniriĝo de nova vizitantino, kiu, kiam la pastron oni prezentis al ŝi, surprize ekkriis : « Sinjoro Bernard, ĉu estas vi aŭ ĉu mi trompiĝas ? — Do vi konas nian novan vikarion, Sinjorino ! diris la mastrino. — Certe, reparolis la Sinjorino, mia ekskonfesprenanto ! eĉ mi estis lia unua konfesantino !!!.....

Mirego !.. Konsterno !... Vidaĵo ! ..

Tuj oni aŭdis krieton, kvazaŭ ĝemon, kaj oni vidis la junan pastron, terure paliĝantan, defali sur sian seĝegon. Li pretekstis subitan malsaneton, aerplenan bezonon kaj malgraŭ flegoj de ĉiuj oferitaj li eliris.

Post tri tagoj, oni sciiĝis ke Abato Bernard estis anstataŭita kaj, de tiu tempo, iam oni ne plu vidis lin en la subprefekta urbo.

Oni pensas ĉiam ke, pro sia kapableco, li estis ankoraŭ pli alte rangigita.

A. BAISSAC.

PRI LA UTILECO DE ESPERANTO

Kiam, dum la estinta monato majo, la anglaj geregnestroj venis Alĝeron, mi profitis de tiu okazo por viziti unu el belegaj militŝipoj, kiuj akompanis la reĝan promenŝipeton.

Kiam mi alvenis sur la ferdekon, mi tie trovis multajn vizitantojn al kiu la maroficiroj kaj marsuboficiroj penadis por doni al ili ĉiujn utilajn sciigojn kaj klarigojn. Sed, bedaŭrinde, tiuj militistoj tute ne sciis la francan lingvon; tial ili estis devigitaj uzi nur la gestojn. Mi estis tre malkontentiĝata, ĉar mi estus deziranta kelkajn teknikajn sciigojn.

Subite, mi ekvidis starantan apatie kaj apogantan sur pafilego, maroficiron, kiu portis, ĉe sia kravato, la esperantistan verdan stelon. Tuj mi ĝojis pri tio, kaj proksimiĝis al li, salutante lin per resona : « Bonan tagon, Sinjoro ! »

Tuj kiam li aŭdis tiujn tri vortojn, li, kun ĝoja vizaĝo, venis rapide al mi, metis mian brakon sub la sian kaj alkondukis min en la maroficiran kunvenejon. Tuj komencis ĉarma kaj interesa babilado. Li parolis Esperanton pli bone kaj pli rapide ol mi (ĉar mi ve ! malofte havis okazon interparoli esperante). Mi petis lin, ke li bonvolu senkulpigi min pro tio. Tamen, post kelkaj minutoj, mi mirige konstatis, ke mi sukcesis paroli preskaŭ tiel bone kaj tiel rapide kiel li. Tiam li vizitigis al mi ĉiujn partojn de l' ŝipo, donante al mi ĉiujn necesajn sciigojn, kiujn mi deziris. Mi perfekte komprenis ĉiujn liajn klarigojn, kaj mi tre kore dankis mian afablan gvidanton.

Poste, ree li alkondukis min en la kunvenejon, kaj tie ni trinkis je la honoro de la Anglujo kaj Francujo, por la sukceso de nia kara lingvo, kaj la bonfarto de ĉiuj niaj samideanoj.

Vi ne povus kredi, kiom mi estas feliĉa memorante tiun neforgeseblan fakton, kaj mi opinias, ke ĉiuj tiuj, kiuj legos tiujn kelkajn liniojn nepre, kiel mi estos konvinkataj, ke Esperanto estas bona por ion ; ke ĝi povas fari al ĉiuj ŝatindajn kaj grandegajn servojn; kaj estonte iĝos la universalan pacilon.

A. BÉZINGÉ.

S-ro Stojev, el Trojan (Bulgarujo), sendas al ni la sekvantan leteron, kiun ni plezure enpresas. Ĝi montras, ke Esperanto estas nun konata kaj parolata en la tuta mondo.

ESPERANTO PAROLATA

Antaŭ kelke da tagoj ne, sed monatoj ; mi instigita de dezirego por scii ĉu Esperanto povas servi al homo ne scianta alian fremdan lingvon krom Esperanto, skribis karton al mia konatulo S-ro Doktoro Brossard el Daprairie (Kanado), petinte lin ke li min informigu : ĉu mi povus trovi laboron ian ajn (kompreneble de mi plenumebla) en Ameriko, antaŭdirinte al li ke mi

krom mia patra lingvo (bulgara) kaj Esperanto, alian lingvon malkomprenas.

Tion ĉi mi faris, ankoraŭ intence, sciigi ĉu Esperanto estas ne sole rimedo por interkompreni sin, ĉe renkonto, du personoj ne komprenantaj unu de la alia la nacian parolon, sed ĉu li (Esperanto) mi povus movigi min inter homoj kun kiuj mi ĉiutage paroadu Esperanton, ĉu plej poste kun ĝia helpo, mi povus esti kapabla por laboro kaj tiamaniere mi nutrigu min ĉiutage.

Ne pasis longan tempon de l' tago kiam mi skribis la karton kaj mi ricevis agrablan respondon. S-ro doktoro Brossard min invitas aliri Kanadon kun antaŭdiro, ke por mi sufiĉas sole Esperanto je travivado en esperanta urbo (Montrealo).

Mi alirus tien, se doktoro Brossard plenumos proponitan de mi kondiĉon...

P. STOJEV.

La antaŭ nelonge okazinta kongreso en Boulogne-sur-Mer sufiĉe elmontris ke Esperanto povas tre bone esti parolata kaj komprenata el ĉiuj homoj el ĉiuj landoj. Ĝi elmontris ankoraŭ la grandegajn progresojn jam farintajn ĉe la tutmondaj civilizitaj popoloj.

BIBLIOGRAPHIE ★ BIBLIOGRAFIO

PHYSIOLOGIE DE LA LECTURE ET DE L'ÉCRITURE.

M. Félix Alcan vient d'éditer cet intéressant ouvrage dû à l'éminent docteur E. JAVAL, membre de l'Académie de Médecine de Paris, directeur honoraire du Laboratoire ophthalmologique de la Sorbonne.

Ce volume, superbement relié et qui ne comporte pas moins de 296 pages, illustré de nombreuses gravures, est du plus haut intérêt au point de vue espérantiste : l'auteur apporte un appui précieux à l'Esperanto dans une dédicace louangeuse au docteur Zamenhof et dans la chaleureuse recommandation qu'il en fait à tous ceux qui ont à cœur d'améliorer la triste situation d'isolement intellectuel de la plupart des aveugles atteints plus péniblement que les voyants par la diversité des langues.

M. le docteur Javal ne reste pas, dans son ouvrage, dans le domaine de la théorie scientifique et c'est avec un merveilleux esprit de detail qu'il aboutit aux conclusions les plus pratiques sur l impression et le choix des caractères, pour que nos livres gagnent en lisibilité et puissent contenir plus de texte dans le même format et le même nombre de pages, et ce, au grand profit pour nos yeux. Il y étudie aussi l'écriture des voyants, l'écriture des aveugles, la sténographie, etc.

En un mot, c'est un ouvrage que nous voudrions voir entre les mains de tous, certains qu'ils en retireraient un réel profit.

Chez Félix Alcan, éditeur, Paris (Bibliothèque Scientifique Internationale) : 6 fr.

**

Legantoj ! Varbu al ni KVIN abonantojn kaj vi estos enskribota kiel proktektanta abonanto al la « Alĝeria Stelo ».

Ni ankoraŭ sendos sesan senpagan abonon al kiu ajn persono kies nomo kaj adreso estos senditaj al ni.

**

ESPERO PACIFISTA.

Ni ricevis la duan numeron de tiu revuo tre bone redaktata, kiun ni rekomendas al ĉiuj esperantistoj pacifistaj, kaj ankaŭ al nepacifistuloj, ĉar ili povas interese legi tiun revuon, kiu enhavas multajn sciigojn pri pacifismo.

Unu numero : 50 centimojn. — Jarabono, sen aliĝo al la Societo Esperantista por la paco : 4 frankojn.

**

ESPERANTA LIGILO.

Enhavo de la 4-a numero (julio-aŭgusto) : 1. Kroniko, Th. Cart ; 2. Petado pri Birdkantoj, G. de la Bassetière ; 3. La Coiombo kaj la Rozo, Grabowski ; 4. Esperanto kaj Latino ; 5. Problemoj ; 6. Miksaĵo ; Felietono : Prul el Lubartov (daŭrigo).

**

ESPERANTAJ ŜLOSILOJ.

La franca ŝlosilo aperis antaŭ nelonge. Kiel la antaŭaj, ĝi estas eldonata de S-ro Ĉefeĉ, kaj enhavas la gramatikajn finiĝojn kaj vortareton da 1839 radikoj.

Tiu ŝlosilo estas tre bona ilo por la divastiĝo de Esperanto ĉe franca lando kaj de nun ni ĝin rekomendas al ĉiuj, kiuj deziras propagandi, kiel eble plej multe, nian karan lingvon.

Unu ekzemplero pezas nur 5 gramojn ; kosto 3 fr. 50 po 100 ekzempleroj.

ESPERO.

VOJAĜO ĈE OKCIDENTAFRIKAJ BORDOJ

Speciale Esperantigita por « Alĝeria Stelo »

UNUA PARTO

FORIRO EL MARSILIO ✣ ORANO ✣ LAS PALMAS ✣ DAKAR (Senegalo)
ALVENO AL KONAKRY (Franca Gineo) ✣ ✣ ✣ ✣ ✣ ✣ ✣ ✣ ✣ ✣ ✣

Estis bela vetero, kiam la 25-an de aprilo 1900, je la tagmezo, ni lasis Marsilion por iri malproksimajn bordojn de Okcidentafriko.

Enŝipigita sur la « Taurus », vaporŝipo de la Fraissinet (Frecine) Societo, mi iris al Konakry (franca Gineo), kun italaj laboristoj por labori al la konstruo de la fervojo Konakry al Niger.

Kompreneble, mia unua penso estis koni la personojn, kiuj, dum dek tri tagoj, estos miaj kunvojaĝantoj: multe da ili estis francaj oficiroj de la kolonia infanterio, kiuj iris al Dakar, al Konakry, al Dahomey, k. t. p.; S-ro Lenfant, esploristo, kiu iris lagon Tchad, pri scienca studa misio; kelkaj komercaj agentoj; koloniaj oficistoj; religiaj misiistoj kaj religiulinoj, jen estis la vojaĝantoj ĉe unuaj kaj duaj klasoj. Soldatoj de kolonia infanterio kaj artilerio, senegalaj soldatoj (Haŭssas) kaj laboristoj de koloniaj laboroj estis ĉe la triaj kaj kvaraj klasoj.

La vaporŝipo « Taurus » estis sufiĉe komforta, kaj mi faris sur ĝi tre agrablan marvojaĝon.

Ni intencas speciale raporti pri la landoj, kiujn mi vizitos, pro tio, mi malmulte parolos pri marvojaĝokazaĵoj, kaj nur, kiam okazos ion sufiĉe interesan por raporti.

Ni do, jam mi diris tion, foriris la 25-an de aprilo, tagmeze; ĝis Orano la marvojaĝo estis belega: la 26 an, ni vojaĝas proksime la bordoj de BALEARAJ INSULOJ, kiujn tre bone ni povas vidi, kaj la 27 an, noktomeze, ni ekĵetas ankron en la Orana haveno.

La urbo duonronde prezentiĝas, ĝi kuŝas sur du montetoj kaj enhavas du malsimilajn urbojn: la Eŭropan urbon, ĉe kiu troviĝas plej ĉiuj belaj konstruaĵoj, ekzemple: la prefektejo, sur la placo « Sidi-Brahim », kie altiĝas la bela monumento por la heroaj militantoj, kiuj mortis por la patrujo en Sidi-Brahima batalo; la poŝtoficejo, la soldatejoj, la malsanulejoj, riĉaj hoteloj, multaj belegaj privataj loĝejoj, k. t. p.; fine, la « Kasba » (citadelo) kuŝas sur la pinto de la dekstra monteto, ĝi estas arabarhitektura konstruaĵo kun terramparoj. La Araba urbo kuŝas sur plataĵo, malantaŭe la prefektejo, sur la maldekstra monteto.

Tiu ĉi parto de Orano, kiun plej ofte oni montras per la nomo « Negra Vilaĝo », konsistas el multaj ĉiaformaj kaj ĉiuspecaj kajutoj, de la plej malpuregaj terkabanoj ĝis la lignbutikoj, kiuj aranĝitaj duonrange, formas mallarĝajn stratojn, aŭ pli ĝuste, malpurajn trairejojn inter kiuj moviĝas tuta mondo el negraj, arabaj kaj hebreaj gebuloj, ĉiuj plej malpuraj unu ol aliaj.

(Daŭrigota).

GRAFO ALBERT GALLOIS,
Membro de la Grupo de Alĝero kaj de la Nordafriko.

GRAFO GALLOIS, en Riolunato (provinco de Modena) ITALUJO, deziras ricevi malnovajn poŝtmarkojn el ĉiuj landoj. Li sendos, interŝange, ĉiujn italajn poŝtmarkojn malnovajn kaj nunajn.

L'INSIGNE espérantiste d'Emile GASSE Etoile Verte INTERNATIONAL
est en vente dans nos bureaux, 57, rue d'Isly, Alger, au prix de **1** franc; par poste recommandé, **1** fr. **15.**
Tous les Espérantistes doivent avoir l'**Etoile Verte.**

BONEGA OLIVOLEO EL "PROVENCE"
KAFOJ. - TEOJ. - ORANĜFLORAKVOJ. - PURA SAPO
Firmmarko: **L'Esperanto**
Petu prezarojn, specimenojn. — Speciala rabato al Esperantistoj por ĉiuj senperaj mendoj. — Agentoj akceptataj en ĉiuj landoj. — Skribu: A-te LANISSON, Salon (B.-du-Rhône) Franclando.
Por la Alĝeraj mendoj, turnu vin al S-ro Louis LANDES, 57, rue d'Isly, Alger.

Le Gérant: MICHEL LLEDO. Alger. — Imp. J. TORRENT, 57, rue d'Isly.

Lettres accentuées de la Maison TURLOT, CHAIX et Cie, 128, rue de Rennes, Paris